

# Christe, cunctorum dominator alme

## Brevier-Himno

Komunaj tekstoj > Dediĉo de preĝejo > horo de la legajoj

*Christe, cunctorum dominator alme,  
plebs tibi supplex resonat in aula,  
annuo cuius redeunt colenda  
tempore festa.*

*Hic locus nempe vocitatur aula  
regis immensi nitidique cæli  
porta, quæ vitæ patriam petentes  
accipit omnes.*

*Hæc tuam plebem sacra cogit ædes,  
hæc sacramentis pia ditat usque,  
cælicis escis alit in perennis  
munera vitæ.*

*Quæsumus ergo, Deus, ut sereno  
adnuas vultu famulos gubernans,  
qui tui summo celebrant amore  
gaudia templi.*

*Æqua laus summum celebret Parentem  
teque, Salvator, pie rex, per ævum;  
Spiritus Sancti resonet per omnem  
gloria mundum.*

*Amen.*

Krist', estro alta Vi de ĉiuj gentoj,  
jen ni, kantante en ĉi sankta halo,  
festas kun ĝojo laŭ la kur' de l' jaro  
nun jubileon.

Ĉi loko estas hal' de l' granda Reĝo,  
pordo aperta al ĉiela gloro,  
kiu akceptas ĉiujn, kiuj serĉas  
vivo-patrujon.

Ĉi dom' kolektas Vian Di-popolon,  
kiu celebras Viajn sakramentojn,  
ĝis en ĉiel' per Vi, eterna nutro,  
ĉiuj ni vivos.

Ni Vin petegas, Dio, Vi favoru  
super la Viaj, ilin Vi konduku,  
kiuj kun amo festas kaj kun ĝojo  
templo-konsekron.

Laŭd' estu sama al la sankta Patro  
kaj al la Filo, Reĝo kaj Savanto,  
al la Spirito tra la tuta mondo:  
gloro eterna.

Amen.

latina T: nekonata verkinto, eble 7-a jarcento

E: Albrecht Kronenberger 2008